**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**NEKROLOGO**

Kun granda bedaŭro ni anoncas la forpason, la 7an de julio, de nia kara amiko César de Mosteyrín. Li estis la plej aĝa membroj de MEL sed aktive partoprenis en esperantaj aranĝoj kaj gvidis kurson de Esperanto en Segovio. Li multfoje parolis pri la Patronino de la Esperantistaro, la Virgulino de la Espero (Virgen de la Esperanza, de la Expectación o de la O) nun li finfine povas paroli al Ŝi en Esperanto. César, pace ripozu!

**EKSTERLANDE**

Rubén Fernández estis elektita por instrui esperanton en Koreio. Li plenstipendie partoprenos en kurso pri la korea lingvo en la Universitato de Wonkwang kaj instruos esperanton en la junulara fako ĉe la centro de ŭonbulismo.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

23 hispanoj, inter ili la MELanoj Pedro Garrote kaj Angelita Sanz, partoprenis en **la 85-a UK** okazinta en Telaviv (Israelo). La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan, sendis salut-mesaĝon al la kongreso. La libro "La poemo de Utnoa" de Abel Montagut, estis unu el la plej balotita dum la enketo pri la plej indaj verkoj en la e-literaturo, organizita de Esperantlingva Verkista Asocio.

Preskaŭ 200 personoj el pli ol 20 landoj, inter ili la hispanoj Miguel Fernández, Ana Manero, David Trigo, Jorge Camacho, Antonio Valén ĉeestis la."**Kultura Esperanto-Festivalo**" en Helsinko (Finlando).

Christian Tricio (Salamanko) vojaĝis trajne ĝis Honkongo por partopreni en la **Internacia Junulara Kongreso**. La karavano eliris de Moskvo: tri tagoj en la trans-siberia trajno, vizito al Pekino kaj post 15 tagoj de vojaĝo oni atingis Honkongon. Al la IJK aliĝis 275 personoj de 30 landoj.

8ª Internacia Esperanto-semajno de la Kulturo kaj Turismo. 30ª de septembro-7ª de oktobro 2000. Blanes (Girona). Pliaj informoj Tel: 937 275 021 kaj luis_serrano@mixmail.com

**HISPANIO**

**David Galadí-Enríquez**, kiu tiel alloge prelegis pri astronomio, okaze de la kongreso en San Sebastián de los Reyes, estas unu el la kunaŭtoroj de nova libro ĵus publikigita "Astronomia Almanako 2000". La libro enhavas diversajn artikolojn , kiuj popularforme rakontas pri astronomio kaj astrofiziko. La eldonisto estis Astronomia Esperanto Klubo.

La Universitato de **La Laguna** ofertas por la venonta akademia jaro 2000-2001 liberelektan seminarion "Enkonduko al Esperanto kaj ĉi ties kulturo". La direktoro de la kurso estas Prof. Alejandro López de Vergara Méndez kaj ĝin subtenas la Fakultato de Filologio. Ĝi komenciĝos venontan februaron kun tri akademiaj kreditoj kaj tridek docentaj horoj. La kurson partoprenos ESTO (Esperanto-societo de Tenerife) kun

kelkaj prelegontoj, kiuj pritraktos diversajn temojn rilatajn al la esperanta kulturo. La rilatoj inter Esperanto kaj la Universitato de La Laguna komenciĝis en la jaro 1947 kiam Prof. Régulo gvidis la unuan liberan esperanto-kurson en la antikva Fakultato de Filologio kaj Beletroj de ĉi tiu universitato.

**NIA VOĈO SEPTEMBRO-OKTOBRO 2000** 1999

## ESPERANTO EN INTERRETO

La Esperanta proverbaro de Zamenhof estas populara ankaŭ en la interreto. La plej nova versio estas konsultebla ĉe la adreso http://esperanto.nu/espro/. Tie la proverbaro estas serĉebla laŭ ĉiu unuopa vorto. Eblas ankaŭ peti de la programo, kiu administras la proverbaron, ke ĝi montru
tute hazardan proverbon aŭ ke ĝi montru plurajn hazarde elektitajn proverbojn ĝis 99 samtempe. Ĉiun fojon la elekto estas malsama. Ankaŭ ĉe esperanto.nu estas preparata 'Proverbaro por la nova jarmilo', kiu estos kreskanta proverbaro komune disvolvigata de la diverslandaj esperantistoj, kiu enhavos novajn proverbojn en esperanto, ofte el aliaj mondopartoj ol tiuj, kiujn Zamenhof prilaboris.

## FONDAĴO ESPERANTO

La Estraro de HEF nomumis dum la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto la novan Patronaron de Fondaĵo Esperanto, tiel ke la nuna konsisto de la patronaro estas: Patrono-Prezidanto: Miguel Ángel Sancho Pardo (Madrido). Patrono-Sekretario: Enrique Piquero Vázquez (Zaragozo). Patrono-Administranto: Víctor Ortiz Gratal (Zaragozo)
Patronoj: Rafaela Urueña Álvarez (Valadolido), Antonio Marco Botella (Zaragozo), Lorenzo Noguero (Zaragozo) Patrono-Direktoro: José María Rodríguez Hernández (Kordovo).

## HEF ANGULO

HEF ricevis de "Esperanto-Fundación Soler" la sumon de 100.000 pesetoj, kiel kontribuo al la agado ĉe Expolingua. HEF ricevis ankaŭ la sumon de 81.392 pesetoj kiel kongresa profito.

La hispana e-movado helpos, pere de HEF, la disvastigon de Esperanto en la hispanlingva Ameriko. Tiucele oni disponigos al UEA 1000 ekzemplerojn de la lernolibro "Esperanto, curso del idioma internacional", kies nuna kosto estas 8000 eŭroj (1.331.088 ptoj).

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas ekde la 2ª de oktobro, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**Baza Kurso**: ekde la 3-a de oktobro, marde kaj jaŭde 18,30-20,00, 8 semajnoj. Kosto 5.000 pesetojn, inkludas lern-materialon. Gvidas Juan del Castillo

**Prelego:** Lundo,16-a de oktobro "Du arabaj landoj: Sirio kaj Jordanio" Lumbildoj de Lupe Sanz

Vendredo 20-a de oktobro ĉe Casa de Guadalajara (Plaza Santa Ana 15) je la 19,30 horo projekcio pri "Groenlandia e Islandia, hielo y fuego"

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::